

# Prago, simple kaj praktike

Konsilaro pri uzado de la Manifesto de Prago en loka kaj nacia informado

## **Enkonduko**

La Manifesto de Prago ekzistas jam de 1996, kaj estas vaste konata kiel konciza klarigo pri la sociaj celoj de la Esperanto-movado. La informa valoro de la Manifesto estas limigita, tamen, de la ebleco ligi ĝin al konkretaj lokaj okazoj kaj agadoj. Okazis pri tio du kunsidoj en la 94a Universala Kongreso en Bjalistoko, gvidataj de la aŭtoro de la Manifesto, Mark Fettes. Tie oni faris diversajn valorajn proponojn por plifaciligi ĝian uzadon. Ĉi tiu konsilaro fariĝis surbaze de tri el tiuj proponoj.

Unue, oni konstatis, ke la lingvaĵo de la Manifesto estas tro konciza kaj abstrakta por ne-intelektula publiko. Necesas klarigo de ĝiaj kernaj tezoj en pli ĉiutaga lingvaĵo.

Due, oni notis, ke la sep tezoj de la Manifesto estas kvazaŭ respondoj al demandoj, sed ke informantoj pri Esperanto ofte devus mem krei la demandojn, ĉar ili ne venos en la kapon de ordinara ekstermovadano. Ekzemploj de tiaj demandoj estas prezentitaj ĉi tie.

Trie, oni konstatis la bezonon de konkretaj ekzemploj de lokaj agadoj, kiuj ligiĝus al la Manifesto. Kompreneble, oni ne povas antaŭvidi ĉiujn okazojn, kiuj povus prezenti sin por tia informa kaj socie engaĝita laboro. Tamen la ekzemploj povas stimuli pensadon pri aliaj ebloj, eĉ se ili mem ne taŭgas al difinita loka aŭ nacia kunteksto.

Tiu ĉi dokumento do trairas la sep ĉefajn tezojn de la Manifesto de Prago, resumante ilin kiel respondojn al ĝeneralaj demandoj socirilataj, kaj aldonante sugestojn pri agadoj, kiujn povus entrepreni individuoj, grupoj, aŭ asocioj diversnivele, por doni al la tezoj konkretan enhavon.

## 1. Kial lingvoj kaj lingvokonoj gravas por demokratio?

En demokratio, ĉiu devas povi partopreni egale. Tamen ne ekzistas egaleco inter la lingvoj, ĉu je loka nivelo, ĉu je ŝtata nivelo, ĉu je internacia nivelo. Tiu lingva malegaleco ege malhelpas la partoprenon de multaj homoj en la politika kaj socia vivo de sia loko kaj lando.

Ĉar Esperanto estis kreita por esti lingvo egale alirebla por ĉiuj, la Esperanto-movado nature partoprenas en la streboj plifortigi demokration diversloke kaj diversnivele.

### Ideoj por loka agado:

- Ĉu oni informas pri ĉiuj publikaj balotadoj en diversaj lingvoj? Se ne, oni povus pensi pri kampanjo por multlingva informado. Se jes, oni povus inviti respondeculojn prelegi pri la graveco de tia informado.
- Ĉu informoj pri la bazaj demokratiaj procezoj kaj strukturoj en via lando haveblas multlingve? Se ne, ĉu eblus kunlabori pri la kreo de multlingva retpaĝaro pri tio?
- Ĉu la politikaj partioj en via lando montras konscion pri la rolo, kiun lingvoj ludas en social integriĝo, ekzemple de enmigrintoj? Ĉu ili subtenas lingvokursojn en la nacia(j) lingvo(j) por alilingvanoj? Ĉu tiaj kursoj estas sufiĉe multnombraj, altnivelaj, kaj malmultekostaj? Se ne, ĉu eblis kunlabori en kampanjo por plibonigi la situacion?
- Kia estas la situacio de rifuĝintoj aŭ aliaj novalvenintoj en via lando? Ĉu eblus proponi al ili helpon de esperantistoj, por iom ekkoni la novan kulturon kaj socion kaj senti amikecon kaj subtenon? Ĉu eblus proponi interpretajn servojn por ili?

## 2. Kiel per lingvolernado oni povas eduki al tutmonda konscio?

En kunplektiĝanta mondo, ekkoni la propran kulturon ne sufiĉas por bona eduko. Sed lingvo-lernado kutime ne multe helpas, ĉar oni lernas nur pri unu nacia kulturo, maksimume pri kelkaj nacioj kiuj uzas la saman lingvon. Tio ne sufiĉas.

Ĉar Esperanto estas komuna posedaĵo de homoj el ĉiuj kulturoj, ĝia lernado malfermas pordon al tutviva interkultura edukado. Tial la Esperanto-movado estas ankaŭ eduka movado, kaj aliancano de aliaj provoj eduki transnacie.

Ideoj por loka agado:

- Kiuj aliaj asocioj aŭ institucioj okupiĝas pri tutmonda edukado? Ĉu eblus kune organizi konferencon, kurson, aŭ alian aranĝon? Kiel Esperanto povus utili por iliaj celoj?
- Se via urbo havas ĝemelajn urbojn, ĉu jam ekzistas kontaktoj kun esperantistoj tie? Ekzistas multaj ekzemploj de ĝemelurba agado kiu utiligas Esperanton.
- Se ĉe vi agadas asocioj por helpo al malriĉaj landoj, ĉu en tiuj landoj troviĝas esperantistoj? Ĉu eblas ligi la esperantistojn al tiuj helpagadoj? Ĉu el tiuj landoj eblas ricevi informojn per Esperanto kiuj utilas al la asocioj aŭ helpas klerigi la ĝeneralan publikon?
- Kiuj okupiĝas pri tutmonda edukado en la lernejoj? Se ekzistas aparta instruista asocio aŭ grupo pri tiu temo, provu kontaktigi ilin kun Esperanto-instruistoj, kiuj komprenas kiel ligi Esperanton al klerigado pri monda temoj.

### 3. Kiel eblas instrui lingvojn efike?

Lerni duan lingvon estas malfacile. Kvankam iuj homoj havas talenton pri tio, por multaj la lerneja instruado de lingvoj ne alportas sukceson. Rezultas granda malŝparo de homaj kaj financaj rimedoj, kaj daŭraj problemoj en la interhoma komunikado.

Ĉar Esperanto estas konscie ellaborita por faciligi la lernadon, ĝi povas esti bazo de vere efika lingvoinstruado, en kiu ĉiu lernanto sukcesas ekregi almenaŭ unu fremdan lingvon. Tial la Esperanto-movado estas ankaŭ movado por pedagogia efikeco – por celtrafa instruado.

Ideoj por loka agado:

- Informiĝu pri la brita projekto *Springboard to Languages* (salttabulo al lingvoj), kiu estas la plej ampleksa nuntempa provo instrui Esperanton en lernejoj kiel enkonduko al la lernado de aliaj lingvoj. Ĉu eblus prezenti tiun koncepton al lokaj instruistoj, lernejestroj, gepatroj?
- Kiuj estas la ĉefaj kritikantoj de via loka aŭ landa eduka sistemo? (Ĉiam estas tiaj kritikantoj.) Ĉu iuj el ili montras intereson pri lingvoinstruado? Provu korespondi kun ili, inviti ilin al landa kongreso, provizi ilin per fakaj informoj pri la instruado de Esperanto el la retpaĝoj de ILEI kaj edukado.net.
- Ĉu vi konas esperantistojn kiuj lernis la lingvon mirinde rapide? Aranĝu intervjuon kun loka gazeto aŭ radiostacio, aŭ instigu ilin rakonti pri siaj spertoj en artikolo.

#### **4. Kial estas bone regi plurajn lingvojn?**

En la moderna mondo, multaj homoj regas nur unu lingvon bone, nome tiun de la lernejo. Tiu unulingveco limigas multajn eblojn, ekzemple de personaj kontaktoj, kono de aliaj kulturoj, kaj ĝenerala kleriĝo.

Ĉar Esperanton oni ĉiam parolas kune kun aliaj lingvoj, ĝiaj uzantoj ĝenerale alte taksas, ĝuas, kaj kultivas sian plurlingvecon kaj la valorojn kiuj akompanas ĝin. Tiusence la Esperanto-movado estas ankaŭ movado por ĝenerala plurlingveco.

Ideoj por loka agado:

- Organizu konkurson por plurlingvuloj kun diversaj defioj, ekzemple legi etiketojn en diversaj lingvoj, mendi manĝon, traduki liston de amuzaj frazoj.
- Aranĝi regulan “kafejon” kun tabloj por parolantoj de diversaj lingvoj, kie homoj povas ekzerci sian lingvoscion.
- Reklamu Esperanto-kursojn (ĉeajn aŭ retajn) en maniero kiu allogas lingvemulojn, emfazante kiel rapide ili povos aldoni novan lingvon al sia repertuaro.
- Ellaboru lernilon en Esperanto pri iu loka aŭ nacia lingvo, kaj aranĝu lanĉon kaj gazetaran konferencon okaze de ĝia eldono.

## 5. Kiel lingvo rilatas al homaj rajtoj?

Malegaleco inter lingvoj ofte damaĝas la fundamentajn rajtojn de la homo — ekzemple, la rajton esprimi sin, la rajton komunikiĝi kun aliaj, la rajton difini la propran identecon, la rajton je edukado. Pro pretendoj de nacia unueco aŭ buĝetaj limigoj, la parolantoj de neŝtataj lingvoj ofte trovas sin en aparte malfavora pozicio.

Ĉar Esperanto estas provo krei neŭtralan kadron por la kunvivado kaj kunlaboro de anoj de ĉiuj lingvoj, la Esperanto-movado estas ankaŭ movado por protektado de la lingvaj homaj rajtoj de ĉiu persono.

### Ideoj por loka agado:

- Informu lokajn aŭ naciajn homrajtajn organizojn pri la agado de UEA pri lingvaj rajtoj, ĉe la oficejo de la UN-Komisiito por Homaj Rajtoj en Ĝenevo. Ĉu eblus kune organizi konferencon, kurson, aŭ alian aranĝon, en kiu oni traktas ankaŭ la lingvajn aspektojn de homaj rajtoj?
- Ĉu iuj homoj en via lando spertas problemojn pro lingva diskriminacio? Ĉu vi povas kontribui al dokumentado kaj diskonigo de tiaj kazoj?
- Ĉu en via loka aŭ nacia lingvo ekzistas retpaĝoj pri lingvaj homaj rajtoj? Se jes, ĉu ili informas pri Esperanto? Aŭ se ne, ĉu vi povas starigi aŭ iniciati the starigon de tiaj paĝoj?
- Organizu eventon aŭ manifestacion por marki konvenajn tagojn en la kalendaro, ekz. la datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj en decembro aŭ la Tago de la Denaska Lingvo en februaro.

## 6. Kian valoron havas lingva diverseco?

Ankoraŭ nun, multaj homoj pensas ke la multeco de lingvoj estas granda ĝeno, precipe ene de la limoj de ŝtato aŭ de plurŝtata unuiĝo. Interalie, ili timas ke la lingva diverseco subfosas la nacian unuecon, malfaciligas komunikadon, kaj bremsas la ekonomian evoluon.

Ĉar Esperanto kreiĝis por uzado en multlingva mondo, la esperantistoj ĝenerale positive sintenas al la lingva diverseco, kaj multaj eĉ agas konkrete por la subteno de malgrandaj lokaj lingvoj. Tial la Esperanto-movado estas ankaŭ movado por protekti la lingvan diversecon.

Ideoj por loka agado:

- Organizu lingvo-festivalon, en kiu la anoj de multaj lingvoj havas standon, artajn prezentojn, fulm-kurson. (Ekzistas pluraj bonaj modeloj de tiuj festivaloj.)
- Kontaktu asociojn por la defendo kaj evoluigo de lokaj lingvoj. Ĉu eblas kune organizi konferencon, kurson, aŭ alian aranĝon, en kiu la situacio de la loka lingvo traktiĝas kadre de pli vasta rigardo al la lingva diverseco?
- Aranĝu poezian vesperon, eventuale kadre de loka literature festivalo, en kiu prezentiĝas poemoj el malgrandaj lingvoj kun esperanta kaj nacilingva tradukoj.
- Ĉu lingva diverseco troviĝas kiel studtemo en la oficiala lernprogramo de lokaj lernejoj? Se jes, ĉu oni povas pretigi materialojn pri Esperanto kiuj enkadriĝas tie? Se ne, ĉu eblas trovi lokon por tiu temo?

## 7. Kiel lingvo povas liberigi la homon?

Ĉu parola, ĉu gesta, lingvo estas nepre necesa por la disvolviĝo de la homa personeco. Tamen tio ankaŭ iusence malliberigas ĉiun personon, ĉar ĉiu el ni havas senperan aliron al nur tre eta parto de la kulturaj malkovroj kaj perspektivoj de la homaro.

Ĉar Esperanto estis kreita kiel lingvo por la tuta homaro, ĝi malfermas pordon al senperaj rilatoj kun multe pli vasta parto de la homara kultura heredaĵo. Kompreneble, ĝi troviĝas ankoraŭ en tre frua stadio de sia evoluo. Tamen, la Esperanto-movado en longa perspektivo estas movado por homa emancipiĝo – por la kreo de mondo, en kiu la potencialo de ĉiu homo trovas pli da ŝancoj disvolviĝi.

### Ideoj por loka agado:

- Kolektu vivrakontojn de diversaj esperantistoj je loka kaj landa nivelo, kiuj evidentigas la pozitivan, liberigan efikon de Esperanto. Publikigu ilin rete aŭ papere; uzu ilin por vekti intereson de ĵurnalistoj.
- Reklamu aŭ artikolu pri Esperanto en revuoj pri memdisvolviĝo aŭ evoluigo de la personeco (per joko, meditado, danco, psikoterapio k.s.). Organizu Esperanto-standon en foiroj/festivaloj pri tiaj temoj.
- Pretigu nacilingvan informilon, kiu emfazas la grandan diversecon de manieroj uzi Esperanto por sia propra kleriĝo kaj disvolviĝo.